# INTER★NI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 219 — Julio 2004

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

**Sendu abon-monon al:**

Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas ankoraŭ \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## NENIE — ĈIE

Kie mi laboras, oni ne donas paperajn ĉekojn al dungitoj kia mi. Ili sendas elektronike la monon el ilia konto al mia konto. Laŭ mia kompreno, tiu maniero de pagado nuntempe estas la kutimo. Lastatempe mi rigardis la paperan anoncon de la sumo, kiun ili sendas interoficeje, kaj mi pensis: tiu papero estas videbla kaj sentebla, sed ĝi ne estas reala. La papero estas nur raporto pri la reala afero. La reala afero estas kodo en la reto, kaj tiu ne estas videbla aŭ sentebla. Do ĉi-foje la senkorpa mondo estas pli reala ol la sentebla.

Mi neniam renkontis esperantiston kiu ŝajnis tute fremda al mi. Kelkaj ŝajnas el alia planedo, sed ne tute fremdaj al mi. Sed kelkaj de miaj najbaroj pensas aŭ parolas en nekomprenebla maniero. Rigardu la elekt-itajn politikistojn en via lando kaj ni devas konfesi, ke multaj el niaj „samlandanoj" vere ŝajnas fremduloj. Ĉu la videbla kaj sentebla lando iĝas malpli kaj malpli reala? Kaj la nevidebla komunumoj de pensoj kia Esperantio iĝas pli kaj pli reala? Antaŭ tri jaroj, miaj kvar infanoj loĝis en kvar malsamaj landoj (Kanado, Usono, Aŭstralio kaj Svislando). Sed ni estis ankoraŭ familio. Ili estis pri proksimaj al mi ol la personoj en la domoj apud la mia.

Mia konjekto: Ju pli boniĝas la elektronika komunikado, des pli realiĝas niaj mensaj landoj.

— **Reni Porter**

## Ruando Post Dek Jaroj

Dum aprilo ĉi-jare la mondo publike notis la dekan datrevenon de la komenciĝo en Ruando de tiu terura kaj grandega buĉado de homoj pro etnaj malamoj. Mi volas agnoski en nia gazeteto la fakton, ke tiu buĉado daŭris dum pli ol tri monatoj. Tagon post tago oni pli kaj pli eksciis pri la teruraj kondiĉoj en la tiu afrika lando, eĉ rigardis televid-raportojn pri teruraj atakoj, sed oni ne kapablis reagi. Ni ankoraŭ devus daŭre demandi: kial ne?

Intertempe oni multe bedaŭras la fakton, ke organizaĵoj kiel la Unuiĝintaj Nacioj aŭ la usona registaro ne kapablis sufiĉe rapide reagi, aŭ ne pretis enmiksiĝi en interna afero de fremda nacio pro miskompreno pri la vera situacio kaj la bezonitaj rimedoj. Ĉu oni nur atendis solvon el la ĉielo? La mondo rapide ŝanĝiĝas, kaj nuntempe homoj de bonvolemo kiel esperantistoj malpli multe toleras krimojn kontraŭ popoloj, kiel ekzemple okazas nuntempe en la darfura regiono de Sudano kaj aliaj regionoj ĉirkaŭ la mondo. Oni ne plu povas nur paroli pri tiaj aferoj, oni saĝe devas agi. Kion vi opinias?

**— Via redaktoro**

## ELNA / KEA Kongreso 2004

La ELNA/KEA komuna kongreso okazis en Sidney, Brita Kolumbio, de la 16a de julio ĝis la 19a, 2004. Tio estis la tria fojo, kiam ELNA kaj KEA kunsidis. (La unua estis en 1978 en Milwaukee, kaj la dua estis en Montrealo.)

Sesdek ses personoj partoprenis: 44 usonanoj, 19 kanadanoj, 2 meksikanoj kaj irlandano. Aldone, 4 personoj aliĝis kiel subtenantoj, kaj mi denove volas danki ilin: Ellen Eddy, Jay Fishman, Dori Wheeler, kaj Mignon Belongie. Ili ricevis ĉiutagan retpoŝtan raporton el la kongreso, kun fotoj, kaj ricevos limakpoŝte sakon kun la kongresaj materialoj.

La programo estis plena kaj bunta, dank' al la helpo de Jim Henry, Geoffrey Greatrex, Alex Schlafer, Wally du Temple, Olga du Temple, David Yaki, Lusi Harmon, Jim Droege, Haruo Ros', Arlyn Kerr, kaj Diana Fobes. Estis multe da kantado, kaj mi suspektas ke neniu forgesos la mirindan „disko"–dancadon (*) de Anderson Mills post la bankedo en greka restoracio. Dank' al la Sidney LKK, ni ĉiam havis bongustajn trinkaĵojn kaj frandaĵojn.

La kongreso estis dediĉita al la memoro de Sid kaj Ruto Culbert, kiuj forpasis en la pasinta jaro. Ili estis dum multaj jaroj fervoraj subtenantoj de Esperantaj agadoj en la nordokcidenta regiono de Usono kaj Kanado. Tablo de memoraĵoj montriĝis, kaj ni aŭkciis librojn kaj malnovajn gazetojn el la kolekto de Sid kaj Ruto por gajni monon por ELNA.

La vetero estis belega, seka kaj varma sed ne tro. Sidney estas pitoreska, apudmara urbeto. Dimanĉon multaj partoprenantoj aŭtobusis al Viktorio por vidi la ekspozicion „Eterna Egiptio" en la provinca muzeo. Dum kaj post la kongreso aliaj iris al la fama Butĉarta Ĝardeno kaj aliaj lokaj vidindaĵoj.

Kelkaj partoprenis en postkongresa ekskurso al Vankuvero, gvidata de Wally du Temple kaj Lusi Harmon.

La oficiala grupfoto, fotita de Kinsey Fobes, estas elŝutebla ĉe http://www.djdigital.info. Baldaŭ videblos tie ankaŭ aliaj fotoj de la kongreso. Intertempe oni povas vidi (kaj aĉeti pere de Ofoto, se oni deziras) kelkajn fotojn ĉe http://tinyurl.com/479mm.

La venonta ELNA kongreso okazos en Austin, Teksaso, de la 10a ĝis la 13a de junio, 2005. Vidu http://esperanto.org/ELNA/kongreso2005 por pli da informo.

**— Arlyn Kerr**

Retpoŝto: arlynkerr@earthlink.net
TTTejo: home.earthlink.net/~lrkerr

**(*) Noto de la redaktoro: Mi kredas, ke Arlyn iom konfuziĝis pri la tre gimnastika prezentaĵo de „tekno"-dancado, kiun mirinde bone faris Anderson laŭ mia opinio.**



# FABELO

En iu fora kaj ekzotika norda lando loĝis kaj vivis malriĉa kamparana familio. En kampoj la patro plantis sekalon kaj hordeon en la printempo kaj sarkis la grenon en la somero. En la aŭtuno li rikoltis la grenon per falĉilo kaj portis hejmen la tigojn kun spikoj, helpe de unu ĉevalo kaj vagono, por draŝi.

La patrino responsis por la kokinoj kaj la ĝardeno, kie ŝi plantis kaj kultivis legomojn por nutri la familion. Kiam ŝi estis ankoraŭ novedzino, oni donis al ŝi kelkajn grajnojn de maizo, kaj ŝi atente plantis la semojn kaj ame vartis la junajn plantojn. Tiu delikata maizo estas speciala bongustaĵo, por meti sur la manĝotablon post la aŭtuna maturiĝo – frandaĵo por la pligrandiĝanta familio. Tamen ĉiam la patrino konservis sufiĉe da grajnoj por planti en la sekvonta printempo.

La infanoj — kaj baldaŭ estis ja sufiĉe da — rimarkis, ke en la jaroj kiam la maizo forte kreskis kaj estis abundaj spikoj de sukoplenaj grajnoj, la patrino estis tre feliĉa. Tamen en tiu lando ne ĉiujare sufiĉe pluvas, kaj kiam la ĉielo forgesis sufiĉe beni la teron per aspergo de akvo, la spikoj estis malmultnombraj kaj etaj. En tiuj jaroj la patrino estis trista kaj ne ofte arkigis la lipojn.

La infanoj frekventis lernejon kie ĉiuj aĝoj troviĝis kune en la sola klas-ĉambro. Tie, eble pro tio, ke la bona instruistino estis hungardevena, ili studis proverbojn, inter aliaj aferoj. La infanoj de nia familio aparte ŝatis la Esperantan proverbaron de Marko kaj Ludoviko. Unu el la plej ŝatataj proverboj temis pri greno kaj pano. Nur por amuzo ili kreis el tiu etan variaĵon, jen: „Kia la greno, tia la panjo.”

— **Steĉjo**